

Pasko, Pentekosto

NE SUFIĈIS LA POTENCO DE LA MORTO

1. Ne su - fi - ĉis la po - ten - co de la mor - to,
ven - kis ĝin la Di - a for - to.
Kaj le - vi - ĝis Krist' Je - su' el si - a tom - bo,
vi - vas en la Di - a glor'.

Refreno:

Ha - le - lu - ja, ha - le - lu - ja,
la Sin - jo - ro vi - vas en la Di - a glor',
ha - le - lu - ja, ha - le - lu - ja,
vi - vas en la Di - a glor'.

2. Por ke ni ne estu solaj en la mondo,
nek ludil' de ĉia ondo,
Li elsendis la Spiriton de l' ĉielo
el la am' de l' Dia kor'.
Haleluja ...

3. En la amo de l' Spirito, lia forto,
ni pilgrimu ĝis la morto.
Kristo vokos ankaŭ nin el nia tombo
al la viv' en Dia glor'.
Haleluja ...